

# ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Vierter Jahrgang



Nr. 6, Juni 1951

## Malfermu al la eŭropaj gejunuloj ĉiujn landlimojn!

Kaj ne nur al ĉiuj ĝejunuloj! Ni ĉiuj aspiras kaj sopiras pri tia libereco! Ni ne volas esti enfermitaj kaj katenitaj per landlimoj! Tial precipe ni germanaj esperantistoj varme aprobas sekvantan leteron, kiun sendis nia franca samideano inĝeniero A. Lienhardt, Mulhouse, al la germana federacia kanceliero D-ro Konrad Adenauer.

### Tre estimata Sinjoro Kanceliero!

Mi sciigis pri via laŭdinda intenco krei eŭropan junular-pasporton, kiu malfermu al la eŭropaj ĝejunuloj ĉiujn landlimojn sur nia kontinento.

Permesu al mi, tre estimata Sinjoro Kanceliero, gratuli vin pro tiu via eksterordinara, interesa ideo: sincere mi deziras ke vi sukcesu realigi ĝin baldaŭ, kaj ke sekve al tio multaj aliaj landoj imitu, profite al sia junularo, tiun valoran iniciaton.

Mi opinias ke tiu afero estos bona okazo por racia apliko de la monda interlingvo Esperanto, kiu helpas — kaj estonte pli kaj pli helpas — la interkomprenon de malsamlingvanoj el ĉiuj landoj. Pro tio mi prenas la liberecon por proponi al vi la jenon:

1. Eldoni la junular-pasporton en formo dulingva (nacia lingvo kaj Esperanto) kiel estis proponite antaŭ nelonge de s-ro D-ro Artur Bornmann en lia rekomendinda verkaĵo: „Memorandum über eine grundlegende Vereinfachung im in-

ternationalen Verkehr durch die Verwendung von zweisprachigen Dokumenten\*.“ Tiu realigajo avantaĝe permesos fiksi la dezirindan unuformecon, laŭ enhavo, de la junularpasportoj en diversaj landoj eldonotaj.

2. Enmanigi al ĉiu germanlanda junulo kaj junulino, kiu ricevos la pasporton, ekzempleron de la modela vojaĝhelpilo: „Sprachführer für alle Gelegenheiten des täglichen

## El la mondo de la Esperanto-infanoj

La legantaro scias jam de kelka tempo, kaj ne nur el la paĝoj de EP, ke en la urbeto Berrenrath proksime al Kolonjo, Rejnlando, ekzistas vigla kaj tre agema klaso da Esperanton sciantaj kaj praktikan-taj infanoj. Kune kun sia Esperanto-instruistino f-ino Kreischer ili aranĝis jam unu fojon tre riĉenhavan ekspozicion kun leteroj kaj poŝtkartoj tutmondaj, desegnaĵoj, pentraĵoj, el kiuj manifestiĝis la

Lebens (Esperanto in der Tasche); Deutsch-Esperanto“, verkita de W. u. H. Wingen kaj eldonita de Limburger Vereinsdruckerei (1950). Tiu praktika interkomprenigilo konsiderinde helpas al ĝiaj uzantoj forigi la lingvajn malfacilaĵojn dum vojaĝoj kaj restado en fremdaj landoj.

Mi estus tre honorata kaj feliĉa, se miaj proponoj povus esti realigitaj, kontribue al viaj gratulindaj klopodoj mense kaj kore proksimigi la junularon de la tuta mondo, kaj por tiamaniere larĝigi la bazon necesan al la konstruo de justa, forma, daŭra paco tutmonda.

Bonvolu akcepti, tre estimata Sinjoro Kanceliero, la esprimon de mia tre alta respekto kaj kora sindonemo.

(Subskribo.)

\*) Vidu EP 8/1950 p. 70.

vastampleksaj kaj plej diversaj interrilatoj, kiujn la infanoj daŭre fleĝas tra la tuta mondo.

Kiel ni legis en EP n-ro 4, p. 47, ankaŭ en nia federacia ĉefurbo Bonn fondiĝis vera Esperanto-klaso, kaj estas esperinde, ke ankaŭ ĝi bone prosperu kaj floradu.

Kaj ĵus antaŭ nelonge, kiel tria floro en ĉi tiu printempa fasketo da lernejaĵ floroj, atingis nin letero el lernejo en Teublitz, Bavarujo, kiun bonvolis transsendi al ni la estro de GEA. Tiu letero, subskribita de ĝekdu da sepaklasanoj, alportas la ĝojigan sciigon, ke ankaŭ tie en Oberpfalz (Supra Palatinato) kreiĝas nova lerneja spirito, kiu tendencas transflui la ordinaran lernokadron kaj deziras sin etendi tra la tuta mondo „per flugiloj de facila vento“, por ekinterrilati ankaŭ kun aliaj edukejoj en tutmondo, kie estas instruata apud la nacia lingvo ankaŭ la internacia, apud la gepatra ankaŭ la gefrata, kie estas kultivata krom amo al la patrujo ankaŭ amo al la homaro, al nia komuna hejmo, la Tero.

Kie eklamas fajreroj por brulo de granda entuziasmo — kaj ni rajtas atendi ĉion de nia Esperantema junularo! — tie ni devas atenti, ilin teni viglaj. Do, laŭpove kuraĝigu la geknabojn laŭ efika maniero. Skribu al Esperanto-grupo de la klaso 7a, nova popollernejo, Teublitz/Oberpfalz, Kr. Burglengenfeld.

## Al la 36-a en Munkeno vin tiu:

**Ne nur** ke post 18 jaroj denove okazas Internacia Kongreso de Esperanto en Germanujo

**Ne nur** ke Munkeno estas urbo ĉiel vidinda

**Ne nur** ke tie laboras tre agemaj kaj diligentaj gesamideanoj

**Sed ankaŭ** ke tie vi povos vivi, ĉe modestaj pretendoj, tre malmultekoste

**Sed ankaŭ** ke vi, kiel junul(in)o, povos tie partopreni la Oratoran Konkurson

**Sed ankaŭ** ke eble tie estos prezentata via eventuale premiita verkaĵo por la Belartaj Konkursoj de UEA.

# 50 JAROJN ESPERANTO

## LA ORJUBILEA UNIVERSALA KONĜRESO EN VARSOVIO

Kongresvojaĝo de samideano el „Malpermesitujo” · De W. Ackermann

(Daŭrigo)

Dume eksplodis milito: li predikis amon, sed eksplodis buĉado. Lia nobla koro ne eltenis, sed liaj ideoj vivas inter ni. — En la nomo de la hebrea komunumo en Varsovio parolis ĝia prezidanto s-ro Mayzel, kaj rabeno Posner parolis en la nomo de la Varsovia rabenaro. — Plorigan paroladon faris s-ino Thilander — la edzino de Harald Thilander. Si esprimis dankemon por Esperanto kaj ĝia ideo, kiuj tiom multe servas al la blinduloj kaj faciligas ilian malfeliĉan kaj malluman vivon.

Apud la tombo de la Majstro okupis lokon la familio. En la nomo de la kongreso oni metis florkronon. Aliaj florkronon, en la nomo de la hungara Esperanto-Federacio, metis Baghy kaj Kalocsay. Sekvis defilado de naciaj grupoj. Ĉiu preteriranto ĉe la tombo klinis la kapon kaj metis floron aŭ floraron. Kreskis la amaso da dianoj kaj lilioj. Kelkiu el la preterpaŝantoj haltis por momento, volis ekparoli, sed, anstataŭ vortoj, larmoj ekfluis el liaj okuloj. — Proksime al la hebrea situas la katolika tombejo. Tie ripozas Antoni Grabowski, la plej intima kunlaborinto de la Majstro kaj la plej favora disvastiginto de Esperanto. Tien nun ekiris la kongresanaro. Parolis Prof. Buywid kaj s-ano Gluck. La parolado de s-ano Gluck estis la plena esprimo de la korsentoj, kiujn nun travivis la multlandaj disĉiploj, pilgrime alvenintaj al la tomboj de la Majstro kaj de Grabowski. Estis ne eble reteni la larmojn en la okuloj, kiam la blankbarbula Prof. Buywid kisis la parolinton pro lia tiom profunda kaj tiom sento- kaj esprimoplena parolado. Forlasinte la tombejojn mi renkontis s-ron Gluck, ni prenis taksametrodroskon, veturis urben kaj tagmanĝis kune.

Posttagmeze Varsovia samideanino akompanis min tra la urbo, montrante al mi ĉefstratojn kaj multajn vidindaĵojn. Ni promenadis sur larĝaj belegaj aleoj kun eĉ kvar arboj. Krome mi miris pri la grandegaj parkoj, kiujn ni travagadis. Preskaŭ ni forgesis, ke la hodiaŭa vespero estis dediĉita por teatro. Rapide vespermanĝinte en Esperanto-Kafejo ni disĝis por refreŝigi kaj alivesti nin. Antaŭ la Varsovia opero, kiu je la unua fojo vidis tian publikon, mi elfiakriĝis precize je la 20-a horo. Ĉiuj lokoj estis okupitaj. Pro fruuliĝo al la kongreso mi ricevis lokon en loĝio. Krom komedio la programo konsistis el du pluj partoj: hungara valso, kantita de virina kvarteto, kaj „Edziĝo-festo en Olkusz”, baleto kun ĉarmaj polaj dancoj regionaj.

Post la prezentado (la vetero estis tro bela por liti iri) multaj gesamideanoj, ankaŭ mi, faris ankoraŭ promenadon ĉe la Vistulo

kaj eĉ ne preterlasis viziti noktan amuzejon. Frumatene fiakro veturigis min al la studenta hejmo, mia loĝejo. — La fiakroj estas vere oportunaj trafikiloj kaj bonaj helpiloj por eksterlandanoj. La uzado estas malmultekosta. Ne scipovante la polan lingvon oni prenas lokon en tiu veturilo, montras al la fiakristo slipon sur kiu estas skribita la celo ne elparolebla, kaj oni povas trankvile dormeti ĝis kiam ĉesas la klakado de la ĉevalhufoj. Senzorge oni atingis la celon. Iom malfacila kaj ankaŭ ne agrabla estas la endomigo, ĉar ĉiuj dom-

plej pentrindan parton de Varsovio, kun mallarĝaj tre malnovaj domoj kovritaj de koloritaj reliefoj. Ni promenadis tra mallarĝaj stratoj kaj troviĝas denove sur Kastela Placo. Ni iras laŭlonge larĝan straton „Kraakowskie Przedmiescie” kun pluraj monumentoj kaj grandaj konstruaĵoj. Interalie monumento de plej granda pola poeto Adam Mickiewicz kaj unu de Nikolao Kopernik, la mondfama pola astronomo. Alveninte sur la „Placo de tri Krucoj” ni vidas dekstre imponajn palacojn, ambasadorejojn, maldekstre belegajn ĝardenojn. En unu, kiu estas la plej bela parko en Varsovio, troviĝas apud lago koketa palaco de lasta pola reĝo Stanisloao Aŭgusto Poniatowski. Krome sentegmenta teatro kaj monumento de Chopin. Ni revenas al la centro de l' urbo tra strato Marszalkowska, ĉe kies fino etendas sin Ĝardeno Saksa. Ni haltas iom ĉe str. Krolewska 41, la domo kie mortis la Majstro kaj kie nun loĝas liaj infanoj. Tra Saksa Ĝardeno ni aliras al Placo Pilsudski, kie ni vizitas la tombon de Nekonata Soldato kaj rigardas monumenton de Princo Jozefo Poniatowski. Atinginte la Teatron Placon ni vidas la urbdomon kaj la „Grandan Teatron”. Tra Ĝardeno de Krasinski ni venas en la hebrea kvartalon, malriĉan kaj modestan. Tie ni trovas la straton de Zamenhof kaj historian por ni domon n-ro 9, kie dum multaj jaroj vivis kaj laboris la Majstro, de kie li sendis en la mondon antaŭ duonjarcento sian „Unuan Libron” kiel D-ro Esperanto. Mi ankaŭ ne volas preterlasi rimarkigi ke ni miregis pri la grandega kontrasto inter la nova kaj malnova urbo. Unuflanke la belegaj aleoj, parkoj ktp., aliflanke treega malpureco. Sur terura pavimeto veturaĉas strangaj ĉevalveturiloj kaj sargaŭtomobiloj flugigitaj la polvon kaj farantaj sufiĉe grandan bruon. Krom tio la kriado de stratvendistoj ktp. Oni vidas ĉifonvestitajn virinojn kaj infanojn; en kelkaj pordoj staras inoj, kiuj palpebrumante invitas la malinojn. Diversaj odoroj nekutimaj atingas niajn flarorganojn.

Vespere je la oka okazis la „Literatura Vespero” aranĝita de „Literatura Mondo”. Tiu vespero denove montris, ke niaj hungaraj samideanoj estas bonegaj organizantoj. La ĉefan rolon ludis Baghy kaj Kalocsay. Ili verdire plenumis 90 procentojn de la programo; alterne, per rakontoj, deklamoj kaj ŝercaĵoj ili katenis la aŭskultataron dum du kaj duona horoj, rikoltante plene meritajn dankojn kaj aplaŭdojn. Multe ankaŭ helpis al la sukceso de la vespero alia „Literatura Mondo”, Ludoviko Totsche, per impresoplena deklamado de siaj verkoj. (Daŭrigota)

## Deklamo

### por juna lernanto

De Esperanto  
Mi estas lernanto.  
En granda movado  
Mi estas helpanto.

Ĝi estas la lingvo  
Por tuta la mondo.  
Ĝi ligas la homojn  
En frata rondo.

Mi estas tre juna  
Kaj eble malsprita  
Sed kiam ni kreskos,  
Ĝi estos lernita.

Mi iras al kurso  
Kun ĝoj' en la koro.  
Sukceso alvenos  
Post vigla laboro.

Mi amas la lingvon.  
Deziras avide,  
Ke vi, aŭskultanto,  
Ĝin lernu rapide. E. G.

pordegoj estas fermataj je la 25-a horo. Domslojloj ne ekzistas, stranga afero. Kiu, loĝanta private, revenas post la nomita horo, devas premi la sonorilan butonon de la pordego. Se la pordisto ne tro profunde dormas, li malfermas la pordon post mallonga atendado. Estas kutimo doni al li dek ĝis dudek groŝojn.

Sekvintan matenon (mardon) mi partoprenas ekskurseton tra la urbo. Ni komencas vizitadon de la „Malnova Urbo”. Ni staras sur la limo de nova kaj malnova partoj de l' urbo, sur „Placo Kastela” (Plac Zamkowy). Jen leviĝas alten 20-metra kolono kun monumento de l' reĝo Sigismundo III-a, starigita en 1644. Jen granda malnova bruna konstruaĵo: Reĝa Kastelo. De Placo Kastela ni eniras straton de S-ta Johano, kie troviĝas la katedralo, gotika, impona konstruaĵo el la 14-a jarcento. Pluen irante kaj rigardante ĉirkaŭen ni eniras la ĉefplacon de la Malnova Urbo, la

# Neŭigkaj aferoj de la Esperanto-Bewegung

## Lehrerzeitung plädiert für Esperanto

Die „Allgemeine Deutsche Lehrerzeitung“ in Frankfurt nimmt in ihrer Nummer 9 Stellung zum Fremdsprachenproblem in den Schulen und schreibt:

„Das Streben nach einem geeinten Europa und einer friedlichen Welt setzt voraus, daß alle die gleiche Sprache sprechen. Und diese Sprache kann weder die englische noch die französische sein, sondern nur die aus den gebräuchlichsten Kultursprachen gebildete, leicht erlernbare Welthilfssprache „Esperanto“. Schlagartige Ausbildung in Kurzlehrgängen versetzt die Lehrerschaft innerhalb eines Jahres in die Lage, den Esperanto-Unterricht in allen Schulen zu erteilen. Der Umstand, daß dieser Unterricht obligatorisch sein muß, entbindet uns von allen weiteren Erwägungen, welche Fremdsprache nun als Anfangssprache die geeignetste sei. Esperanto muß zusätzlich zu allen Fremdsprachen von allen Kindern erlernt werden. Es beginnt mit dem fünften Schuljahr mit vier Wochenstunden.“

## Esperanto-freundliches Island

Wie das „American Esperanto Magazine“ aus Reykjavik berichtet, ergab eine öffentliche Umfrage, daß 72,5 Prozent der Bevölkerung Islands für eine baldige Einführung der internationalen Sprache Esperanto sind. 17,1 Prozent waren dagegen und 10,4 Prozent ohne Meinung.

## Internationales Pädagogisches Esperanto-Seminar in Deutschland

In dem von der UNESCO herausgegebenen „International Handbook Study Abroad“ wird auf das Internationale Pädagogische Esperanto-Seminar in der Vollmarschule (Schloß Aspenstein) in Kochel am See hingewiesen, das im Auftrage der Internationalen Liga der Esperanto-Lehrer, Sitz Birmingham, von der Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer (Kitzingen) veranstaltet wird.

## Vorlesungen über Experimental-Physik in Esperanto

Prof. Dr. H. Sirk, Wien, wird während der Internationalen Sommeruniversität in München eine Experimental-Vorlesung über die Bestimmung der Loschmidt'schen Zahl (Anzahl der Moleküle) in Esperanto halten.

## Pater John La Forge und Esperanto

Jesuitenpater John La Forge empfahl anlässlich eines Vortrages in München bei unüberwindlichen Sprachschwierigkeiten die Verwendung der internationalen Sprache Esperanto.

## Rio de Janeiro: 90-Minuten-Funkprogramm über Esperanto

Die in ganz Brasilien unter dem Namen „Familienkonversation“ bekannte Funkserie einer Radiostation in Rio de Janeiro hatte vor kurzem die Esperantistenschaft zu Gast. Genau 90 Minuten unterhielt sich die Funkfamilie mit den Sprachfreunden.

In Petropolis, Brasilien, wurde im vergangenen Jahr ein Lichtspieltheater mit dem Namen „Cine Espe-

ranto“ gegründet. Der Besitzer wirbt damit für die internationale Sprache und hofft, daß die örtliche Esperanto-Gruppe „Cine Esperanto“ zu ihrem Stammkino macht. Wie berichtet wird, sind Esperantisten und Besitzer mit dem Erfolg dieser ausgezeichneten Idee zufrieden.

## Esperanto an deutschen Schulen

An zwanzig westdeutschen Volksschulen wird gegenwärtig die internationale Sprache Esperanto als wahlfreies Fach unterrichtet. An der Volksschule St. Marien in Bonn wurde dieser Unterricht als Pflichtfach eingeführt.

## Ni vizitas nian samideanon s-ron D-ron Walter Döhler en lia Esperanto-biblioteko en Klingenberg

Granda, hejtebla biblioteka ĉambro nin akceptas. Tablo kaj tapiŝo, skribotablo kun skribmaŝino, fumaĵar-tableto, elektraĵ lumigiloj. Sed estas ja tago, kaj la lumo larĝe enverŝigas tra la vasta fenestro.

Sed nin precipe kaj antaŭ ĉio interesas la granda libroŝranko (antaŭfronto da preskaŭ 6 kvm). Ĝi estas plenplena je Esperantaĵoj, nur la supra meza parto enhavas alilingvajn ĝeneralajn sciencajn verkojn kaj la plej novan eldonon de la „Granda Brockhaus“, verkego tre diligente uzadita de la vizitantoj. En kvin sesonoj de la ŝranko kuŝas Esperantaj verkoj, krome sur la ŝranko staras 26 ujoj kun kongres-memorajoj kaj alia malgranda materialo, kaj fine aktostablo entenas pliajn jarkolektojn da Esperantaj ĵurnaloj. Nia afabla gastig-

(ankaŭ perpoŝte en la Germana Federacia Respubliko) estas postulataj kaŭcio kaj porprunta pago, ĝenerale 10% de la aktuala librovaloro.

Kaj kion ni vidas en tiu ĉi libraro? Ĝia speciala valoro konsistas sendube en la multaj sciencaj verkoj kaj serioj da revuoj (La Revuo, Oficiala Gazeto, Scienca Revuo, Esperanto de UEA, Esperanto Triumfonta, Heroldo, Germana Esperantisto, la eldonaĵoj de la Akademio k. a.). Kompreneble da plej diversaj libroj ekzistas granda kvanto, kaj eĉ longjaraj esperantistoj miras ĉiam denove pri la jama riĉeco de nia literaturo.

Riĉeco — kaj valoro, Esperanto-biblioteko, eĉ malgranda, ĉiam diferencas en grava punkto de alia: ĝi estas multe pli vasteca, ĝi ne limigas sin nur je unu aŭ kelkaj landoj. Ne, la tuta mondo estas entenita en ĝi; same kiel ĝi enhavas verkojn el la lando de la leviĝanta suno, same ĝi enhavas tiajn de la plej ekstrema okcidento, de sudaj landoj, kie misterumas ankoraŭ la verda infero de tropikaj ĝangaloj, kaj de regionoj, kie preskaŭ sinfine severa vintro regas kun neĝo kaj glacio.

Sed pardonu! Ni deziras ankoraŭ demandi s-ron Döhler, kion li intencas fari per siaj duoblaĵoj, kaj ni ĝojas eksciante, ke ili estos intersanĝataj kontraŭ aliaj mankantaj numeroj. Por la Munkena kongreso estas preparata listo de haveblaj kaj de havindaj bibliotekeroj. Tiel eble aliaj bibliotekoj kun Esperantaj libroj povos kompletigi sian stokon.

Ni forlasas la trankvilan domon ĉe la rando de Klingenberg. La zorgeme flegita ĝardeno kun siaj delikataj floroj, arbustoj kaj arboj refortigas en ni la agrablan impreson, kiun ni gajnis, observinte interne la delikatan harmonion regantan en la mondo de la scienco kaj de nia lingvo internacia, kiu tiel bele manifestigas en tiu tutmonda biblioteko.

Lao.



D-ro Döhler: la kolekto

anto diras al ni, ke ankaŭ en la subtegmentejoj ekzistas ankoraŭ materialo kaj en grandaj kestoj duoblaĵoj por interŝanĝo.

Oficiale tiu privatbiblioteko — kies uzado en la ĉambro mem estas tute senkosta — estas libere alirebla por la publiko marde kaj lunde. Sed oni povas ankaŭ anonci sin (tel. 495 Amt Klingenberg) por aliaj tagoj. Por prunteprenoj



## Aktuala Terminareto

abwürgen (Motor) sufoki  
 „abzweigen“ depreni, dekonduki  
 Anhänger (Wagen) postveturilo  
 Auspuffgase elflu-gasoj  
 Der Betrieb ist voll ausgelastet: la entrepreno (establaĵo) estas plene okupita  
 Blut/gruppe sango/kategorio.  
 ~spender -donanto. ~übertragung, ~transfusion -transigo  
 Bodenfrost terfrostoj  
 Box (Kamera) kest/kamero, -fotilo  
 Creme (Zahn-, Rasier-) pasto  
 Dirndlkleid alpulina robo  
 sich eindecken mit sin provizi per eingefrorene Gelder barita, blokita mono  
 Führerschein konduk-rajtigilo  
 Gas geben premi la gaspedalon, allasi gason, ~hebel gaspedalo  
 Geltungsdrang, -bedürfnis impondeziro  
 Hilfestellung falgard(ul)o  
 Hilfsschule subnormala lernejo  
 Kaffeewärmer kruĉoĉapo, -mantelo, varmkonservilo  
 Kälteeinbruch enfluo de malvarmo  
 Klartext neĉifrita teksto  
 Klimaanlage klimat/farilo, -instalaĵo, -reguligilo  
 Kord, Rippsamt korduro  
 Kulturfilm (behandelt oft die Natur!) instrua filmo  
 langfristige long/tempo, -daŭra  
 Laster (= Lastwagen!) ŝargaŭto  
 Lastzug (aus Lastwagen) ŝargaŭta trajno  
 Locher truilo  
 Löscher inksorbilo  
 Mittelschule mezgrada lernejo  
 Motorantrieb motora pelo, mov(ig)o  
 Müll rubaĵo, balaaĵo, ~abfuhr rubaĵ-forportado, ~schlucker rubaĵ-kondukilo, ~verwertung -eksploato  
 Niemandsland inter/frontero, -limejo  
 Plattenspieler elektra gramofono  
 Rauchverzehrer fum/sorbilo, -konsumilo  
 Rennrad, -boot usw.: konkur...  
 Ringtausch cikla interŝanĝo  
 schall/dicht sonsorba, ~platte son/disko, gramofono —  
 Schrecksekunde reaga tempo  
 schwänzen (Schule) forresti (kulpe)  
 Staffelpreise gradigitaj prezoj, laŭkvantaj —  
 Steingarten alpa ĝardeno  
 Stellungen (militärisch) pozicioj  
 Ton/abnehmer, -arm sonprenilo  
 Trockenrasierer sekrazilo (sensapa)  
 ungerechtfertigte Härten nepardon-eblaj od. gravaj malmildajoj

Unu leganton ne kontentigis la traduko „kuŝbedcher Lippenstift“ = senspura lipkolorilo“ en la Marta numero. Li argumentis: se la lipkolorilo efektive estus senspura, ĝi ankaŭ ne povus postlasi koloron sur la lipoj mem! — Kiu trovas pli bonan tradukon por tiu gravega ilo? Eble „nekopia“; ĝi estus tute trafa, sed sonas strange. Cetere mi dankas pro ĉi tiu kritiko kiel pro ĉiu alia motivita. Hans Wingen.

## Agigas pri . . . ?

Hin und wieder begegnet einem dieses schreckliche Wort, das völlig sinnlos eine wörtliche Übersetzung der deutschen Redewendung (Germanismus\*) „es handelt sich um...“ ist. Agigi = *veni en la staton de agi*. Es stehen uns viele Möglichkeiten zur Verfügung, um „es handelt sich“ in Esperanto auszudrücken: *la afero estas oder Koncernas, temas pri, estas parolo pri* u. a. Also weg mit dem agigi-Ungeheuer!

M. Butin

\* Germanismus = deutsche Spracheigentümlichkeit.

## Fidi und konfidi

Beide Wörter werden dauernd verwechselt. Selbst Dr. Zamenhof hat die Begriffe von fid' und konfid' manchmal durcheinandergeworfen. Ja, Deutsch ist eine schwere Sprache: trauen, vertrauen, Zutrauen haben (nicht zutrauen, das etwas anderes bedeutet) und anvertrauen. Trau, schau, wem. — Laßt uns sehen! fidi = trauen, vertrauen, Zutrauen haben, konfidi = anvertrauen. Hier ein anschauliches Beispiel: mi ne povas konfidi al li mian sekreton, ĉar mi ne fidas lin.

La sinfido = das Selbstvertrauen. Das wollen wir nie verlieren; dann

fällt es nicht schwer, fidi von konfidi zu unterscheiden. Ein konfidato ist kein Vertrauter, sondern ein Schützling, ein Anvertrauter, d. h. ein Mensch, der jemandem anvertraut wird. Ein Vertrauter heißt intimulo.

M. Butin.

## Kunst, künstlich, künstlerisch

Bei der Bildung von mit dem Stamm „Kunst“ gebildeten Wörtern geht es oft kunterbunt zu. Wir wollen uns von Dr. Zamenhof belehren lassen. Ich entnehme seinen Werken folgende Beispiele: Künstliche Blumen = artefaritaj floroj; künstliche Haare = haroj artajaj; künstlerische Bildung = artisma klereco; künstlerische Fähigkeit = artista kapableco, künstliches Licht = arta lumo.

Daraus ergibt sich: arta = nicht natürlich, artefarita = nicht natürlich, aber gemacht, hergestellt; die künstlichen Haare sind Haare und keine Papierfäden, bilden aber als Ganzes eine artaĵo. Arto = Kunst ist der Gegensatz zu Natur und bezeichnet alles Künstliche, artismo ist die wahre Kunst (Künstlerische), d. h. das Nichtnatürliche in höchster Vollendung, artisma = künstlerisch (artismo betreffend), artisto = Künstler und artista = künstlerisch (artista betreffend); künstliches Licht ist also nicht artefarita lumo. Eine klare Unterscheidung ist sehr wohl möglich.

M. Butin.

# Traduktasko 20

Unsere Übersetzungsübungen sollen auch einen praktischen Zweck haben, nämlich eine kleine Vorbereitung auf Prüfungsarbeiten sein. Der nachstehende Text wurde bei einer Kapableco-Prüfung der Prüfungskommission Köln als Übersetzungsaufgabe gegeben. Er ist durchaus nicht so leicht, für eine einfache Sprachprüfung eigentlich noch zu schwer. Aber die Prüflinge, die wackeren, „forchten sich nit“ und nahmen die Hürde sogar mit „gut bis sehr gut“. Versuchen Sie, diesen Text in etwa 3/4 Stunden in gutes Esperanto zu übertragen.

Der Plan, Eisenbahnen zu bauen und zu verwenden, wurde anfangs von Autoritäten in England und Deutschland bekämpft. Bayerische Ärzte erklärten, die schnelle Bewegung der Eisenbahnen würde Wahnsinn hervorrufen. Der preussische Oberpostdirektor sagte, ein solcher Plan sei ein Hirngespinnst und eine Kinderei; und selbst der Dichter Grillparzer schrieb in einem Gedicht, die Eisenbahn sei eines der Mittel, um „zum Teufel zu fahren“. — Auch der Plan, statt Kerzen und Öllampen Leuchtgas zu verwenden, wurde stark bekämpft. Z. B. erschien in der Kölnischen Zeitung vom 13. 3. 1819 ein Aufsatz, der sieben wichtige Einwände gegen die Gaslampen auf den Straßen enthielt. Wir wollen nur einige davon aufführen. Das Gaslicht müßte aus der öffentlichen Kasse bezahlt werden, und folglich müßten auch die Personen mitbezahlen, die es nicht wünschten. Die Pferde würden von den hellen Lichtern erschreckt werden, und die

Diebe könnten ihr nächtliches Handwerk besser betreiben. Große Geldsummen würden jährlich ins Ausland hinausgehen, um Kohlen, Maschinen usw. zu kaufen. Die Wirkung der Festbeleuchtung an unseren nationalen Festtagen würde abgeschwächt werden, wenn allabendlich eine Beleuchtung durch Gaslampen erfolge.

Wenn man solche dummen Worte gegen eine nützliche Erfindung hört, denkt man da nicht an den Widerstand vieler Menschen gegen Esperanto? Hoffen wir, daß auch die Welthilfssprache siegen wird, ebenso wie das elektrische Licht die alten Öllämpchen zum Verschwinden gebracht hat.

## Por la tri plej bonaj tradukoj ni disdonas tri premiojn:

1. Vortaro de Christaller, 2. Jar-kolekto 1950 de EP bindita, 3. Esperanto in der Tasche. Ĉe samvaloraj tradukoj decidos la loto. Lasta tempplimo por sendo: 31-a de julio 1951.

# La danc-legendeto

El la Sep Legendoj · Traduko de Hans Wingen

Laŭ noto de S-ta Gregorio, Musa estis la dancantino inter la sanktuloj. Infano de estimataj gepatroj, ŝi estis graciplena fraŭlino, kiu diligente servis la Dipatrinon, movata de nur unu pasio, nome de nebridebla dancemo, tiel ke, se la infano ne preĝis, ĝi tute certe dancis. Kaj en ĉia maniero, Musa dancis kun siaj ludkunulinoj, kun infanoj, kun la junuloj kaj ankaŭ sola; ŝi dancis en sia ĉambreto, en la halo, en la ĝardenoj kaj sur la herbejoj, kaj eĉ kiam ŝi iris al la altaro, tio pli vere estis ĉarma dancado ol irado, kaj sur la glataj marmorplatoj antaŭ la preĝejpordo ŝi neniam preterlasis rapide provi danceton.

Iutage, kiam ŝi troviĝis sola en la preĝejo, ŝi eĉ ne povis deteni sin, paŝi kelkajn dancfigurojn antaŭ la altaro kaj kvazaŭ danci plaĉan preĝon antaŭ la virgulino Mario. Ĉe tio ŝi forgesis pri ŝi mem tiel multe, ke ŝi imagis nur sonĝi, vidante ke sinjoro aĝeta sed bela dancis renkonte al ŝi kaj kompletigis ŝiajn figurojn tiel lerte, ke ambaŭ kune prezentis la plej artan dancon. La sinjoro portis purpuran reĝorobon, oran kronon sur la kapo kaj brile nigran buklan barbon, kiu estis tuŝita de l' arĝenta prujno de la vivojaroj kvazaŭ de fora stelobriilo. Kune sonis iu muziko el la ĥorejo, ĉar seso de malgrandaj anĝeloj staris aŭ sidis sur ties balustrado, lasis de ĝi pendii malsupren la dikajn rondajn kruretojn kaj manipulis aŭ blovis la diversajn instrumentojn. Ĉe tio la malgranduloj estis tute senceremoniaj kaj praktikaj, kaj igis teni la notfoliojn per la rozkoloraj piedfingroj. Tiu estis ankaŭ la plej fervora: la ceteraj balancis la piedojn, etendis susure — jen tiu, jen alia — la flugplumojn, tiel ke iliaj koloroj iris kiel kolombokoloj, kaj ŝerce incitetis unu la alian dum la ludado. Por miri pri ĉio ĉi Musa ne trovis tempon, ĝis kiam estis finita la danco, kiu daŭris sufiĉe longe; ĉar la gaja sinjoro ŝajnis senti sin dum ĝi same bone kiel la virgulino, kiu kredis sin saltanta en la ĉielo. Sed, kiam la muziko ĉesis kaj Musa staris plenspirante, ŝi nun komencis vere timi kaj rigardis mire la maljunulon, kiu nek spiregis nek estis varmiĝinta kaj nun ekparolis. Li ekkonigis sin David, la reĝa prapatro de la virgulino Mario kaj ŝia sendito. Kaj li demandis ŝin, ĉu ŝi ne havas emon pasigi la eternan beatecon en senĉesa ĝojodanco, danco, kompare kun kiu la ĵus finita estas nominda melankolia treniĝado?

Al kio ŝi tuj respondis, ke ŝi ne scias deziri por si

ion pli bonan! Al kio la beata reĝo David rediris: Tiukaze ŝi devos fari nenion alian, ol rezigni dum ŝiaj teraj vivotagoj pri ĉia plezuro kaj ĉia dancado kaj dediĉi sin nur al pentofaro kaj la religiaj ekzercoj, sed senŝancele kaj sen ia rekulpiĝo.

Tiu kondiĉo hezigitis la fraŭlinton kaj ŝi diris: Do tute ŝi devos rezigni pri la dancado? Kaj ŝi dubis, ĉu en la ĉielo oni efektive dancas? Ĉar ĉio havas sian konvenan tempon; ĉi tiu tergrundo ŝajnas al ŝi bona kaj laŭcela por danci sur ĝi; sekve la ĉielo verŝajne havas aliajn ecojn, alikaze morto ja estus superflua afero.

Sed David klarigis al ŝi, kiam ŝi eraras en tiu rilato, kaj pruvis al ŝi per multaj bibliaj lokoj kiel ankaŭ per sia propra ekzemplo, ke la dancado jes estas sanktigita okupo por beatuloj. Sed nun necesas, li diris, rapida decidiĝo, jes aŭ ne, ĉu ŝi volas eniri per tempa abnegacio en la eternan ĝojon aŭ ĉu ne; se ŝi ne volas, tiam li pluiros; ĉar oni bezonas en la ĉielo ankoraŭ kelkajn dancistinojn.

Musa staris ankoraŭ ĉiam dubanta kaj nedecidiĝema kaj ludis timeme per siaj fingropintoj ĉe la buŝo; ŝajnis al ŝi tro severe, ne plu danci ek de la nuna horo pro nekonata rekompenco.

Sed jen David mansignis, kaj subite la muzikistoj ludis kelkajn taktojn de tiel senekzemple feliĉega, supertera dancmelodio, ke la animo de la knabino saltetis en ŝia korpo kaj ĉiuj membroj ekmoviĝis; sed ŝi povis regi eĉ ne unun por dancado, kaj ŝi rimarkis, ke ŝia korpo estas multe tro peza kaj rigida por tiu melodio. Plena de sopiro ŝi metis sian manon en tiun de la reĝo kaj promesis, kion li postulis.

Subite li ne plu estis videbla, kaj la muzikintaj anĝeloj susuris, flugetis kaj premis sin for tra malfermita preĝejfenestro, post kiam ili laŭ petola infana maniero estis frapintaj siajn kunrultajn notfoliojn sur la vangojn de la paciencaj ŝtonanĝeloj, tiel ke

klakis. Sed Musa iris hejmen piapaŝe, portante tiun ĉielan melodion en siaj oreloj, kaj igis fari por si maldelikatan vestaĵon, demetis ĉiujn ornamajn kostumojn kaj surmetis tiun. Samtempe ŝi konstruis por si ĉelon en la fundo de sia gepatra ĝardeno, kie kuŝis densa ombro de arboj, pretigis en ĝi liteton el musko kaj de nun vivis tie disigitaj de siaj samdomanoj kiel pentofarantino kaj sanktulino. Ĉiun tempon ŝi pasigis preĝante, kaj oftete ŝi batis sin per skurgo; sed ŝia plej severa pentofaraĵo estis tiu, teni la membrojn malmove kaj rigide; kiam ajn iu sono aŭdiĝis, — la pepado de birdo aŭ la susurado de folioj en la aero, — ŝiaj piedoj konvulsiiis kaj opiniis, ke ili devas danci.

Kiam ne volis forperdiĝi tiu senvola konvulsiado, kiu kelkafoje, antaŭ ol ŝi atendis tion, delogis ŝin al

FRIEDRICH SCHILLER

## La Vortoj de l' Kredo

Tri vortojn mi nomas plenajn je ver',  
Por ties prospero mi preĝas.  
Ne loĝas ili en tera ekster',  
En ĉies brusto nur reĝas.  
Al tiu homo mankas valor',  
Se li ne havas ĉi-vortojn en kor'.

La homo kreigis libera kun vol',  
Eĉ se li naskiĝus en ĉenoj.  
Ĝeniĝu do ne pro kriad' de l' popol',  
Pro fiaj misuzoj, malbonoj.  
Je sklav' ribelanta pro subpremitec'  
Ne tremu je homo en liberec'.

Kaj la virto ne estas vanta ĥimer',  
Malebla por homo akiri,  
Eĉ se li misage faletas sur ter',  
La Dian li povas aspiri.  
Kaj kion ne vidas saĝula okul',  
Praktikas senvole la simplanimul'.

Divolo plej sankta vivadas en pac',  
Sed homa varias la menso.  
Altege super la tempo kaj spac'  
Regadas plej alta la penso.  
Dum ĉio ŝanĝiĝe cirkulas sur mond',  
Persistas kvieta spirit' en flurond'.

Tri vortojn memoru plenajn je ver',  
Por ties plenumo mi preĝas.  
Ne loĝas ili en tera ekster',  
En ĉies brusto nur reĝas.  
Al tiu homo ne mankas valor',  
Se li bongardas ĉi-vortojn en kor'.

Tradukis el germana lingvo: Bernd Hasecke



Walter Baumann

## Tagmeza kvieto

*Assona il cielo bianco — Il vento stanco.*

Antonio Fogazzaro

Sub blanka firmamento  
Sopiras laca vento  
Kaj svenas en silent'.

Silentas bosk', herbaro,  
Kaj inter koloraro  
La lago el arĝent'.

Kaj en ripoz' mistera  
Mi pensas pri sincera  
Pri mi pensanta kor'.

El „Postrikolto“. Tradukis Antoni Grabowski

Sur la dormant-ebeno  
Trankvila Alp-tereno  
Nur viglas en moment'.

Apenaŭ tra l' kvieto  
Aŭdiĝas tintileto  
De iu bruto, for.

malgranda salto. — tiam ŝi igis kunforĝi siajn delikatajn piedetojn per malpeza ĉeno. Siaj parencoj kaj amikoj miris tage kaj nokte pri la ŝanĝiĝo, ĝojis pri la posedo de tia sanktulino kaj gardis la ermitejon sub la arboj kiel sian propran okulon. Multaj venis por preni konsilon kaj propetadon. Precipe oni venigis al ŝi junajn knabinojn, kies paŝado estis iom malgracia; ĉar oni estis rimarkinta, ke ĉiuj, kiujn ŝi tuŝis, tuj ekhavis malpezan kaj ĉarman irmanieron.

Tiel ŝi pasigis tri jarojn en sia ĉelo; sed ĉirkaŭ la fino de la tria jaro Musa estis iĝinta preskaŭ tiel delikata kaj travidebla kiel somera nubeto. Konstante ŝi kuŝis sur sia liteto el musko kaj rigardadis sopirplene en la ĉielon, kaj ŝi jam imagis vidi tra la blua danci kaj ŝovgliti la orajn plandumojn de l' beatuloj.

En malmilda aŭtuntago fine estis dirate, ke la sanktulino kuŝas mortanta. Si jam igis depreni de si la malhelan pentoveston kaj surmeti brilege blankajn robojn edziĝfest-

ajn. Tiel ŝi kuŝis, kun la manoj kunmetitaj, kaj atendis ridetante la horon de morto. La tuta ĝardeno estis plena de piaj homoj. la aero murmuris kaj la folioj de l' arboj malleviĝis teren ĉiuflanke. Sed ne-supozite la blovado de la vento ŝanĝiĝis en muzikon, ĝi ŝajnis ludi en ĉiuj arbopintoj, kaj kiam la homoj suprenrigardis, jen ĉiuj branĉoj estis vestitaj per juna verdado, la mirtoj kaj granatarboj floris kaj bonodoris, la tero kovriĝis per floroj, kaj rozkolora brilo kuŝiĝis sur la blanka delikata figuro de la mortantino.

En tiu momento ŝia animo forlasis ŝin, la ĉeno je siaj piedoj rompiĝis kun hela sono, la ĉielo malfermiĝis vaste ĉirkaŭe, plena de nemezurebla brilo, kaj ĉiu ajn povis enrigardi. Jen oni vidis multmil belajn fraŭlinojn kaj junajn sinjorojn en pleja lumo, dancantaj en senfina rondo. Sur nubo, ĉe kies rando staris malgranda ekstra muzikistaro de ses anĝeletoj, majesta reĝo veturis ioman spacon al la tero kaj akceptis la figuron de

la beata Musa antaŭ la okuloj de ĉiuj ĉeestantoj, kiuj plenigis la ĝardenon. Oni ankoraŭ vidis, kiel ŝi saltis en la malfermitan ĉielon, kaj tuj dancante perdiĝis en la sonantan kaj lumantan rondomovon.

En la ĉielo ĝuste estis alta festotago; kaj en festotagoj estis kutimo — kio ja estas kontestata de S-ta Gregorio el Nyssa, sed ree asertata de tiu el Nazianzus — estis kutimo inviti la naŭ muzojn, kiuj alitempe sidis en la infero, kaj lasi ilin en la ĉielon, por ke ili faru helpajn servojn tie. Ili ricevis bonan manĝaĵon kaj trinkaĵon, sed post plenumita helpo devis reiri al la alia loko.

Kiam nun estis finitaj la dancoj kaj kantoj kaj ĉiuj ceremonioj, kaj la anĝelaroj eksidis por manĝi, tiam Musa estis kondukata al la tablo, ĉe kiu la naŭ muzoj estis servataj. Ili sidis preskaŭ timante kunpremitaj kaj rigardis ĉirkaŭen per siaj fajraj nigraj aŭ intensbluaj okuloj. La agema Marta el la evangelio persone zorgis pri ili, estis ĉirkaŭiĝinta sian plej belan kuirejan antaŭtukon, havis ĉarman fulgomakuleton sur la blanka mentono kaj afable trudetis ĉion bonan al la muzoj. Sed nur kiam Musa kaj ankaŭ S-ta Cecilino kaj ankoraŭ aliaj virinoj, spertaj pri arto, tien venis kaj serene salutis la timemajn pierianinojn kaj aliĝis al ili, jen ilia retenemo degelis, ili perdis sian timon, kaj en la virina rondo evoluis ĉarme gaja kunestado. Musa sidis apud Terpsikoro, kaj Cecilino inter Polihimnio kaj Eŭterpo, kaj ĉiuj tenis unu la alian ĉe la manoj. Nun venis ankaŭ la malgrandaj muzikbubetoj kaj flatis al la belaj virinoj, por ricevi kelkajn el la brilaj fruktoj, kiuj radiis de sur la ambrozia tablo. Reĝo David mem venis kaj alportis oran pokalon, el kiu ĉiuj trinkis, tiel ke dolĉa ĝojo ilin varmigis; ĝojkontente li iris ĉirkaŭ la tablo, ne sen karesi por momento la mentonon de la aminda Erato dum la preterpaso. Kiam tiel oni alte festis ĉe la muzotablo, aperis eĉ Nia Sinjorino en ĉiu sia belo kaj boneco, sidiĝis por horeto ĉe la muzoj kaj karese kisis sur la buŝon la majestan Uranion sub ŝia stela krono, ĉe la adiaŭo kaŝe frustrante al ŝi, ke ŝi ne kontentigis, ĝis la muzoj povos resti en la paradizo por ĉiam.

Sed tamen ne tiel okazis. Por pravi sin dankaj pro la montritaj boneco kaj afablo kaj dokumenti sian bonan volon, la muzoj interkonsiliĝis kaj ekzercis en fora angulo de la subtera mondo laŭdohimnon, al kiu ili provis doni la formon de la solenaj floraloj kutimaj en la ĉielo. Ili dividis sin en du partojn de po kvar voĉoj, super kiuj Uranio havis kvazaŭ supran voĉon, kaj tiamaniere kreis strangan kantmuzikon.

Kiam poste la plej proksima festotago estis solenata en la ĉielo, kaj la muzoj denove faris sian servon, ili profitis momenton, kiu ŝajnis favora al ilia plano, sin lokis kune kaj komencis milde sian kantadon, kiu tamen baldaŭ potence



# FUMO

De P. Muñoz Seca · El la hispana tradukis José Fernando Berenguer

(Fino)

Johano: Jes, ŝi venos. La loko ne povas esti pli taŭga; neniŭ sciĝos pri via renĉevuo; vi aranĝos viajn aferojn, kaj ĉio en ordo kaj paco. Mia fratino vin pardonis jam. Vi amas ŝin, kial do vivi malkune?

Henriko Jes, vi estas prava. (Rimarkante la ĉeeston de Benítez kaj González.) Sed, jen troviĝas du homoj; ili okupis nian lokon.

Johano (rigardante ilin): Estas vere.

Henriko (rigardante ilin): Tio kontraŭas min.

Johano (rigardante ilin): Povas esti, ke ili baldaŭ foriros; jam estas malfrue.

González (al Benítez): Ili nin rigardas.

Benítez: Jes.

González: Kio estos?

Benítez: Eble ili ekkonis nin.

Henriko: Kion ni faru, por ke ili foriĝu?

Johano: Nenion, homo. Kion do fari?

Henriko (rigardante ilin): Sajnas esti du asiluloj.

Johano: Jes.

Henriko: Al la demono la maljunulojn!

Johano: Ne malpacientiĝu, homo, kaj venu! Ili ja foriros.

Henriko (forlasante kun Johano la scenejon dekstre): Estas necese, ke ili foriru. Kiu povus imagi, ke en ĉi tiu horo kaj ĉi tiu loko... (for)

González: Estas strange.

Benítez: Jes.

González: Ili nin rigardis kaj ŝajne diskutis.

Benítez: Verŝajne unu el ili konas nin; la alia ne, kaj ambaŭ dubas. Ĉu vi vidas? Ankoraŭ ni estas ni.

González: Rigardu! Ili ne fortunigas la okulojn de ni.

Benítez: Kaj ili revenas.

González: Sajnas ke ili volas paroli al ni kaj ne kuraĝas.

Benítez: Estas vere. Sed jes, amiketoj: ni estas ni. Ni! (Reeniras la scenejon Johano kaj Henriko.)

González (vidante ke Henriko ekiras al li post ŝanceliĝo): Ili kuraĝas.

Henriko: Pardonu min. Ĉu eble estas vi...

Benítez (interrompante lin): Jozefo Maria Benítez kaj Rafaelo González, sinjoro.

Johano: Ne: mi diras ke... ĉu vi bonvolus esti tiel afablaj ke... ke vi lasus ĉi tiun benkon al ni.

Benítez: (palega): Kion?

Henriko: Renĉevuo en ĉi tiu loko nin devigas...

Johano: Jes, honorafero.

Benítez: Sed...!

Henriko: Interŝanĝe por ĉi tiu favoro... (li ekprenas manon de Benítez kaj metas en ĝin karese kelkajn pesetojn).

Benítez (ekster si, tremegante pro indigno): Kio estas tio? Mono! Ne! (Levante la brakon kaj jetonte la pesetojn al la piedoj de Henriko.) Se estas ĝi almoz', sinjor', rigardu mian faron!

González (haltigante lian manon): Konservu ĝin, amiko.

Benítez: Ne!

González (malĝoje): Gardu! Ni povos manĝi hodiaŭ; ne fermu la pordon, kiun Dio malfermis al ni.

Benítez (subpremas sian indignon, obee lasas fali la brakon kaj hontigite klinas la kapon.)

Henriko (al Johano): Ĉu vi komprenas tion?

Johano (faras signifan movon de miro kaj surprizo).

González (kun amo al Benítez): Ni iru, Henriko, ni iru! (Al la ceteraj): — Tre bonan tagon, sinjoroj, kaj multajn dankojn! (Sekigante larmon): Tre bonan tagon!

Henriko (ne atentante ilin, rigardante avide al la kontraŭa flanko): Mi opinias, ke ŝi venas, Johano; mi kredas, ke estas ŝi.

Benítez (retenante singulton): Bonan tagon! (Ekprenante González'on ĉe la brako kaj malproksimiĝante de la benko): Rafaelo! (Vidante ke González sekigas larmon): Vi ploras?

González: Pro ĝojo! Ni manĝos!

Benítez: Je kosto de la lasta iluzio. Ni ne estas ni. Rafaelo, ni ne estas. Nin forgesis ĉiuj, ĉiuj!

González: Dio ne, Joĉjo... Dio ne!

(Kurteno)

ŝvelis. Sed en ĉi tiuj spacoj ĝi sonis tiel melankolia, preskaŭ eĉ obstina kaj kruda, kaj tamen tiom sopirplena kaj plenda, ke unue regis tima silento, sed poste ĉiuj tie estis tuŝataj de terdoloro kaj nostalgio, kaj ekestis ĝenerala plorado. Senfina ĝemado muĝis tra la ĉielo; konsternite la plejaĝuloj kaj profetoj alrapidis, dum ke la muzoj en sia bona intenco kantis pli kaj pli laŭte kaj melankolie, kaj la tuta paradizo kun ĉiuj patriarkoj, plejaĝuloj kaj profetoj, ĉiu, kiu iam ajn iris aŭ kuŝis sur verda herbejo, perdis la sinregon. Sed fine la plej alta Triunuo mem tien venis por restarigi ordon kaj silentigi la fervorajn muzojn per longe sonoranta tondrobato.

Nun trankvilo kaj egalanimeco revenis en la ĉielon; sed la bedaŭrindaŭ nau fratinoj devis ĝin forlasi kaj de tiam ne plu rajtis enpaŝi ĝin.

## La korneo

Humorajo. De M. Mielert.

Vi certe ne scias, kio estas tio, tiu korneo? Trankviliĝu! Ankaŭ mi ne scias ĝin, ĝis... Sed atendu momenton — Vi tuj komprenos —

Mi havas du filinojn. Ambaŭ edziniĝis kaj nun estas feliĉaj patriinoj de po unu ĉarma knabineto. Aŭ ĉu vi eble dubas, ke ili estas ĉarmaj? Mi nur povas konsili al vi, kredi ĝin, alie timu mian avan koleron!

Nu, iun tagon mia pliaĝa filino ludas kun sia knabineto. Subite ŝi ekkrias. Kio okazis? La etulino estis puŝinta sian fingreton en okulon de la patrino, kio kaŭzis al ŝi netolereblajn dolorojn. Rapidege mia bofilo veturis kun sia edzino grandurbon, por konsulti okulkuraciston. La profesoro faris zorgan mienon. „Estas serioza afero! La infano difektis la okulon, sufiĉe grave forskrapante pecon de la korneo.

Mi ne povas garantii, ke la vidkapablo restos sendifekta...“

„Pro Dio“, mia filino kriis, „estas ja terure! Cetere, sinjoro profesoro, kio estas korneo?“

„Nu, ni kuracistoj nomas korneo la kalon de la okulo. Estas ja simila substanco kiel la kalo.“

„Jes, jes, mi komprenas! Sed kompatu min kaj savu mian okulon! Ho vi, malgrandulineto, kion vi faris...!“

Komprenable mia filino devis resti en la kliniko. Mia bofilo, reveninte hejmen, rakontas al la maljuna iom seninteligenta servistino, kion diris la profesoro kaj finis: „Kaj imagu nur, sinjorino Huber, la profesoro timas, ke mia edzino povos perdi la vunditan okulon, ĉar la malgrandulineto forskrapis sufiĉe grandan pecon de la korneo!“

„???“

# Internationale Sprache — Internationale Schrift

Es ist leicht erklärlich, daß gleichzeitig mit dem Gedanken einer internationalen Sprache auch der Gedanke einer internationalen Schrift entstand. Leibniz und Wilkens, später Bachmair, Damm und andere beschäftigten sich damit und brachten mannigfache Lösungen; jedoch keine war derart, daß sie eine weitere Verbreitung gefunden hätte.

Daß nach einer gewissen Ausdehnung der Esperanto-Bewegung auch das Bedürfnis nach einer international brauchbaren (Kurz-)Schrift — wir sprechen hier hauptsächlich nur von einer Kurzschrift — entstand, nimmt deshalb nicht wunder. Es sei betont, daß es sich nicht um die gewöhnliche Schrift handelt; diese Frage hatte Esperanto durch Annahme der sogenannten lateinischen Schrift, die bei den meisten Kulturvölkern in den gebildeteren Schichten bekannt ist, bereits endgültig gelöst. Nein, auch die ständig wachsende Zahl der Benutzer einer Kurzschrift wollte sich einer solchen auch beim Esperanto bedienen, und so gab es bald Übertragungen der verschiedensten nationalen Systeme; die Zahl der Originalschriften für Esperanto blieb aber gering.

Nun ist es ja ganz schön, wenn man mit seiner gewohnten Kurzschrift auch Esperanto schreiben kann; aber diese Kenntnis genügt auf internationaler Basis nicht; jedes Land verwendet ja seine eigene Kurzschrift. Es erhebt sich daher zwangsläufig die Frage nach einer überall verwendbaren (Esperanto-)Kurzschrift, die man wohl oder übel noch neben seiner nationalen Kurzschrift erlernen müßte, es sei denn, daß sich diese internationale Kurzschrift auch ohne weiteres, d. h. mit nur geringfügigen Änderungen, auch für die verschiedenen Nationalsprachen verwenden ließe. Eine doppelte Stenographie, d. h. zwei Systeme gleichzeitig — eins für die Weltsprache — bedeutet naturgemäß eine beträchtliche Belastung des einzelnen Kurzschrifters. Diese wäre nur in der eben angedeuteten Weise, nämlich durch ein und dieselbe Schrift für beide Zwecke, einigermaßen zu vermindern.

Die Zahl der nur für Esperanto geschaffenen Kurzschriften ist, wie schon gesagt, nicht groß. Es sind dies: „L' Espero“ (1908, Ch. Barit), „Aoro“ (1908, R. Sprotte), „Lernolibro de la plej simpla kaj plej facila Stenografio“ (1912, L. Jakob), „Cies“ (1926, Dyba), „Originalstenografio por Esperanto“ (1929, Brabée).

Als nationales und gleichzeitig internationales System ist besonders Intersteno hervorgetreten, das auf der Nationalstenographie von Felix von Kunowski beruht und in den zwanziger Jahren eine ziemliche Verbreitung gefunden hat. Die Sprechspur (Parolspuro), eine hauptsächlich nach dem Zweiten Weltkrieg erschienene, nicht bedeutend abgeänderte Weiterentwicklung desselben Systems, ist bisher als Stenographie in den Kreisen der Esperantisten noch wenig bekannt und verbreitet.

Wie für Esperanto als Welthilfssprache, so gelten auch für Intersteno als Welthilfs(kurz)schrift gleiche oder ähnliche Gesetze:

Einfachheit, Leichtigkeit, Klarheit und Schreibflüssigkeit. Ferner muß es auch die Anforderungen, die man an es als Schnellschrift stellen kann, erfüllen können.

Die EP will ihren Lesern, die sich für diese Frage interessieren, eine gedrängte, aber ausreichende Einführung in Intersteno mit anschließendem kurzen Hinweis auf die Sprechspur geben. Sie möchte damit den Vielschreibern, die eine Kurzschrift für ihre internationale Korrespondenz benötigen und noch keine Lösung für dieses Problem gefunden haben, die Möglichkeit bieten, sich mit einer Lösung vertraut zu machen, die bereits auf eine praktische Verwendung auf nationalem und internationalem Gebiet und auf eine gewisse Verbreitung unter den Esperantisten der ganzen Welt hinweisen kann.

„Ho, mi forgesis, klarigi al vi, kion signifas korneo. Montru do al mi viajn manojn! Jen, vidu, tio estas kalo, ĉu ne? Kaj la kalon en la okuloj la kuracistoj nomas korneo.“

„Granda Dio“, ekkriis la maljunulino, „granda Dio, nia sinjorino havas kalon sur la okuloj? Ho la bedaŭrinda sinjorino, la bedaŭrinda! Kia malfeliĉo!“

Mirigite mia bofilo ekaŭskultis. „Kion vi opinias? Kalon sur la okuloj? Kompreneble mia edzino havas korneon, nature ne sur la okuloj, sed en la okuloj, ĉar la korneo ja estas grava parto de la okulo kaj apartenas al ĝi!“

„Ne, ne, ne, vi ne povas konvinki min! Mi nun estas 65-jara kaj mi havas sufiĉe da kalo sur miaj manoj kaj piedoj. Sed sur miaj oku-

loj mi ne havas kalon, dank' al Dio, ne, ne!“

„Sed komprenu do, ĉiu prudenta homo havas korneon. Sen korneo la okulo ja ne estus okulo!“

„Ne, ne, ĉu kalo, ĉu kornuo aŭ kiel nomigas tiu aĵo, tiel stulta mi ja ne estas, mi ne havas kalon sur miaj okuloj!“

Jus mia bofilo intencis forlasi la ĉambron suprentirante la ŝultrojn, kiam la maljunulino subite faris ruzan mienon dirante: „Nia kara sinjorino ja povas esti feliĉa!“

„Feliĉa? Kial do, pro Dio? Si havas dolorojn, ke ŝi povus supreniri la murojn, kaj vi diras, ke ŝi ĝoju?“

„Nu jes, sinjoro, ĉar vi ja mem diris, ke la infaneto forskrapis grandan pecon de la kalo. Estas do bone, ĉar nun ni povas esperi, ke la okulo resaniĝos, ĉu ne?“

„Sinjorino Huber, mi vere ne scias, ĉu mi ridu aŭ ĉu mi ploru!“ Kaj li definitive forlasis la ĉambron.

Post kelke da tagoj venas telefonlvoko el la kliniko, kaj mia bofilo rapidis al la grandurbo. Kun radiantia vizaĝo li revenas.

„Sinjorino Huber, sinjorino Huber, ĝoju, ĝoju kun mi! Imagu nur, la profesoro diris al mi, ke jam ne estas danĝero pri la vundita okulo, ĉar la korneo rekreskas. Eble post tri semajnoj mia edzino povos reveni hejmen!“

Sed la maljunulino nur kapskuis murmurante: „La bedaŭrinda sinjoro, nun li ŝajne perdis sian prudenton, ĉar li ja ĝojas, ke la kalo sur la okulo rekreskas. Ho, kia malfeliĉo, kia granda —“

## El nia esperantista kuriozaĵujo

EP en novembro 1950 ricevis leteron de la alia flanko de l' Fera Kurteno, strangan leteron. Dubante, ĉu la skribinto aŭ estas tiel naŭva aŭ tiel impertinenta, ni ĝis nun ne publikigis ĝin; sed, finfine, ĉu la EP-legataro ne konatigu unu fojon ankaŭ kun tiaŝpecaj personoj? — La letero estas fidele kopiita laŭ la originalo, troviĝanta en la redakto.

Tre estimataj samideanoj!

En Anbetracht mia geistigen Vorbildung der Kanzlei- kaj Büro-behördenfachmännischer Tätigkeit kaj Kenntnissen, gestatte mi ol Esperanto-batalanto de Esperanto-batalantomovado ĝentila demando ĉu mi min: — „Al la disvastigado ke la enkonduko kaj la progresado la lingvo Esperanto sur la areno de la teritorio germanujo.“ —

Mi petas pri pro ĝentila al mi en tiu ĉi afero ĉi tiu Bewerbung neniom Schwierigkeiten zu breiten kaj almi: — „Al (usw. wie oben — Red.) ... gütigst übertragen zu wollen.“

En la Hoffnung mia Bewerbung-Gesuch Berücksichtigung kaj Vertrauen gefunden havas; sowie davon Beachtung kaj Kenntnis genommen wurde, mi petas ĝentila en ĉi tiu afero dieser Bewerbung die ne länger zögern lassen zu wollen kaj al mi petas. Bescheid mia adresso senden zu wollen.

Mi estas malriĉa kaj homaĉo esenco rentisto kaj ricevas monata 65 markoj kune kun mia fianĉino kaj ankaŭ ankoraŭ 10 dek markoj monata loĝipago. Mi ne aĉenti neniu mono la Esperanto-lernlibroj bonvolu min asisti kaj sendas tagoŝirfolia (tagoŝirkalendaro) murokalendaro, poŝkalendaro, leterokesto 20 dudge centimetro larĝa kaj 35 tridek-kvin centimetro longa en ellingvo Esperanto: — „Letero- kaj gazeto kesto skribas kun la Esperantoinsigno, la estas propagando per Esperanto. Mi kaj mia fianĉino ne havas kaj ne aĉeti varma vintrovestaĵo de kapo ĝis piedo, mi kaj mia fianĉino estas metro granda; mia ŝuo numero estas 43 mia fianĉino ŝuo numero estas 41. Bonvulo alta ŝuoj larĝa, ĉar mi kaj mia fianĉino havas kokoj-okuloj, por min kaj mia fianĉino varma vintromantelo, por mia fianĉino vintro



# MIGRADO, MIA KORPLEZUR' ...

Eĉ se pluvas! Eĉ se vento blovas! Komprenoble, ĉe sunbrilo kaj varma agrabla aero la migrado estas pli plezuriga. Tion mi konstatis je pasinta pentekosto, kiam mi partoprenis internacian junularrenkontiĝon de la internacia turist-asocio „La naturamikoj“. Gi okazis en la valo de Vicht, ne malproksime de Stolberg, Rejnlando. Grandaj kaj malgrandaj tendoj ĉiufasonaj leviĝis sur supreniĝanta herbejgrundo antaŭ arbara rando. Gaje flirtis grandaj flagoj de la najbaraj landoj. Supre, je la plej alta loko, estis konstruita scenejo, kies fundon prezentis granda pentrita terglobo kun du manoj, kiuj ĉirkaŭ ĝin sin premas reciproke. Ĉu ne bela simbolo? Sed, bedaŭrinde, ofte nur la manoj sin komprenas, ne la kapoj. La langoj formas malsamajn parolojn; oni rifuĝas al la primitiva lingvo de la gestoj.

Sed la naturamikoj jam ne estas tiel nesciaj pri la rimedo, kiu ankoraŭ mankas al ili, por krei vere internacian harmonion. Jam sur kelkaj tendoj signalis la verda stelo, ke Esperanto jam ludas sian rolon, kaj tute spontane interrenkontiĝis pli ol du dekedoj da gesamideanoj, el Merkstejn, Düren, Köln, Düsseldorf, Hagen, Dortmund, Saar-teritorio, Belgujo kaj Svislando. Kiel ĉiam, tuj regis samideana sento kaj harmonio, kaj kvankam inter ili la uzado de nia lingvo ne estis deviga pro ebla minaco de nekompreneblo, tamen ĝi servis kiel bela komuna ligilo.

Antaŭtagmeze je pentekosta lundo dum preskaŭ duona horo tri geesperantistoj el Kolonjo en germana lingvo kaj en Esperanto paro-


ladis tra la mikrofono kaj aŭdebligis per ĉiuj laŭtparoliloj tra la tuta tendaro. Supozeble tio denove forte altiris la ĝeneralan atenton al nia afero kaj ideo. Krome oni disdonis varbfoliojn.

Ke nia lingvo ankoraŭ ne estas

sufice disvastigita en la rondo de la naturamikoj, devas nin instigi varbi speciale inter ili. Nia devizo do estu:

Naturamikoj, fariĝu esperantistoj!  
Esperantistoj, fariĝu naturamikoj!

Mm.



Wollen wir uns in engen, rauchigen und überheizten Stuben einsperren, wenn draußen die Sonne lacht und die Weite lockt?

varmaroboj kun longaj brakoj, por min kaj mia fianĉino varma vintroĉemizoj, por mia fianĉino varmaj ĉemizoj kun longaj brakoj, por min kaj mia fianĉino varmaj strumpoj.

Mi havas ankaŭ ankoraŭ unua senpatrina filo en aĝo 15 dek tri jarojn kaj estas en orfojdomo. Bonvolu helpas. Al la propagando la lingvo Esperanto petas mi ĉirkaŭ tri 3 Esperanto-insignoj kaj agiti-varbiskripaĵoj. Bonvolu sendas min kaj mia fianĉino longaj subpantalonoj.

Mi kaj mia fianĉino scii tuta precize tio nur samideanoj-esperantistoj sub samideanoj-esperantistoj certa asisti helpas. tial mi mia mizero skribas.

Bonvolu sendas por min kaj mia fianĉino ĉapo aŭ ĉapelo, por mia fianĉino eine Haube, manotuko. Wegen meinem senpatrina infano fühle ich mich gezwungen zu heiraten.

Bonvolu al mi skribas mia adreso.

Kun esperantista saluton  
A. B. ... (Turingio)

Bonvolu sendas por mia fianĉino Büstenhalter. Bonvolu kompati kon-

cerni niaj mizero kaj al ni helpi asisti."

PS. de la red. — Nu, kion vi diras nun, tre estimataj gelegantoj de EP? Mi, unnan fojon leginte, fakte ne scias, ĉu plori aŭ ridi. Tial mi faris ambaŭ. — La letero havas minimume la avantaĝon esti tute sincera. En sia tuta krudeco ĝi montras

tamen la du grandajn risortojn de la homaro: amo kaj sinkonservemo! Kaj al ili devas adaptiĝi ankaŭ Esperanto, ankaŭ ĝia ideo. Tute egale, ĉu laskrubinto estis homo kun nur malvastaj spiritaĵkapabloj sed sincera, aŭ homo malvastspirita, kaj krome ruza kaj ekspluatema ... ĉi tiu letero restas ĉiukaze interesa, eĉ grava morala (kaj iomete ankaŭ lingva) dokumento.

## Auf dem Büchertisch

Einzelne eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Heute liegen zur Abwechslung ein paar Musiknoten auf dem Büchertisch. Wir wollen sie uns mal etwas näher ansehen.

**Ĉiu Ĉiu Ĉiu Ĉiu (Chiu Chiu).** Französischer Text von André Hornez, Esperanto-Text v. Raymond Schwartz, Musik von Nicanor Molinare. Musikverlag „Imperia“, 150, Champs Elysées, Paris (8e). Erhältlich bei Esperantista Centra Librejo, 41, rue Descartes, Paris (5e). Preis nicht angegeben.

Dieser überall bekannte Schlager wird auch schon unter den Esperantisten, hauptsächlich den jungen, nicht erst seit gestern viel gehört. Er hat einen straffen

Rythmus, entbehrt nicht der Melodie, und R. Schwartz hat ihm nicht nur einen grammatisch richtigen, sondern sogar sinnvollen Text gegeben.

Die Titelseite ist richtig. Eine lippen- und augenlidergeschminkte, mit Stirnlocke winkende, argentinisch anmutende, oben nicht allzu sehr bekleidete und mit einem mächtigen fünfzackigen Stern Brustgeschmückte Maid steht im Interessenmittelpunkt verschiedener Gauchos oder Cowboys. Darunter befinden sich die Porträts von Ray Ventura, anscheinend Kapellmeister, und von Marga Rinetta, anscheinend ... ja was denn? Seinerzeit war sie ein Stern im „Verdkata Kabaredo“.

**Paris toujours Paris (Pariz' ĉiam Pariz'),** und darüber: Le grand succès international. Also wird es schon stimmen. Der französische Text

stammt von L. Bergen le Play, die Esperanto-Übertragung schuf R. Schwartz, die Musik schrieb J. M. Hamonic, Musikverlag Omnium, 25, Rue du Faub. du Temple, Paris (10e), erhältlich wie oben, Preis wie oben.

Der Esperanto-Text dieses Walzer-Chansons ist eher eine Nachdichtung als eine Übersetzung, was durchaus eine Anerkennung sein soll. Sed la ambacia rekantaĵo estas, ke oni vivas nur en Pariz'. Die Titelseite trägt — wie könnte es anders sein — den Eiffelturm und einen perspektivisch gesehenen Esperanto-Stern, ferner die Bilder dreier charmanter Pariserinnen, ich nehme es mindestens an, darunter wieder Marga Rinetta.

Beide Stücke bringen die Noten für eine Singstimme. Darüber gesetzte, etwas geheimnisvolle Zeichen, z. B. Fa7, Sib, Mib könnten Akkorde für Gitarre bedeuten. Jofebo.

**Konstanz — Bodensee.** Ein mehrfarbiger Prospekt, wie man ihn gerne sieht.

Er zeigt uns „die alte Stadt am Bodensee und Rhein“ in ihrer ganzen Schönheit, mit ihren idyllischen Gassen, ihrem Münster und Theater und vor allem mit ihrem herrlichen See und seinem Strand.

Der vierseitige eingehaftete Esperanto-Text vermittelt dem Esperanto-Kundigen in schöner Sprache alles Wissenswerte und wirbt gewiß auch bei Anderssprachigen. Nur unu demando: Ĉu estis nepre necese diri, ke K. situas, laŭ Schulte (Sulte), apud la plej favorata lago... Ĉu estis tiu Schulte? Ĉu li estis vere tiel signifoplena por lin citi?

La Internacia Ferio Semajno en Konstanz (28. 7.—4. 8. 51) estos antaŭkongreso de la 36-a en Munkeno kaj samtempe perfekta Esperantokurso. Instruas tie s-roj T. Morariu, M. Mielert kaj H. Müller. D-ro Ivo Lapenna partoprenos kiel reprezentanto de UEA.

La relative malalta prezo de 70 gmk. enhavas ĉion inkl. ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo, al Aŭstrujo kaj Svislando. IFS celas: harmonian kuneston en mirinda pejzaĝo kun lingvoscia perfekteĝo.

Turnu vin al IFS Esperanto, Konstanz, Grüngang 2, Germ. Mm.

**La vojo al daŭra paco kaj ĝenerala prospero.** Ein Flugblatt der International Union for Land Value Taxation and Free Trade, 4 Great Smith Street, London, S. W. 1, wo man es kostenlos in Englisch, Deutsch, Esperanto, Spanisch und Italienisch erhalten kann.

Es ist eine Deklaration des 7. Internationalen Kongresses zur Förderung der Besteuerung des Bodenwertes und des Freihandels (progresivo de Tervalora Impostado kaj Libera Komercio). Die Vereinigung erhofft durch Verwirklichung ihrer Ideen die Beseitigung jeglicher Steuern, Zolltarife und fiskalischen Lasten und damit dauernden Frieden und Wohlfahrt aller Völker. Jfb.

**Kolonjo apud Rejno.** Auf einem Din A 4-Blatt werden hier die Esperanto-Übersetzungen eines Bilderheftes der Stadt Köln geboten, das wohl zu den schönsten der bisher von ihr herausgegebenen gehört. Es hat die Größe 27×37 cm, 32 Seiten, heißt einfach „Köln“ und ist beim Städtischen Verkehrsamt in Köln, Domkloster 3, erhältlich. Deutsche Esperantisten mögen ihre ausländischen Korrespondenten veranlassen, es dort zu verlangen unter Hinweis auf obiges Übersetzungsblatt. Die Stadt freilich hat keine Esperanto-Übersetzung herausgegeben; das Heft selbst ist aber dreisprachig: Deutsch, Englisch und Französisch. Das Übersetzungsblatt ist erhältlich zum Preise von 0,05 DM bei Hubert Ringbeck, Köln-Sülz, Redwitzstr. 12.

Was wohl keinem so recht gefällt, ist die Verwendung von ch, gh, jh und u statt ĉ, ĝ, ĵ und ŭ. Ferner hätte man gewünscht, daß bei den Eigennamen die (annähernde) Aussprache in Esperanto angegeben wäre, z. B. Reichard (Rajhart). Damit wäre hier auch ch = ĉ ausgeschlossen gewesen. Aber die Übersetzung ist recht gut, der Druck klar und übersichtlich. Möge dieses Blatt viele Esperantisten in aller Welt mit dem wiedererstehenden und doch alten Köln erneut bekanntmachen. B.

# MODKANTOJ

Sendube, tiaj kantoj havas entuziasmajn amikojn, sed ankaŭ akrajn malamikojn. Certe estas, ke same okazas pri iliaj Esperantaj tradukoj; sed tamen, ĉi tie ekzistas ŝajne malgranda diferenco: plinombas la amikoj, ne pro la kantoj mem, sed pro la tradukoj, kiuj donas al nia lingvo novan interesan ŝancon montri sian viglan vivantecon.

Al ĉi tiu demando skribis nia estimata abonanto s-ro B. Zenker:

„... instigis min la publikigo de „Donja Juanita\*““. Mi volas gratuli vin, ĉar mi estas konvinkita, ke ĝi trovis aprobon de multaj, precipe de la junaj samideanoj. Kompreneble, publikigo de tia moda dancanto ne estas esence grava por nia movado. Sed pro alia vidpunkto ĝi estas ege valora. Estas unu el la metodoj pli interesigi kaj pli aktivigi la junularon. Tiu flanko de nia movado bedaŭrinde ĝis nun estas tro multe neglektata de ni pli maljunaj „seriozaj“ esperantistoj. Tute malprave. Mi bone rememoras la tempon kiam mi mem estis juna samideano. Ĉiam mankis taŭgaj melodioj por plivigligi la kunvenojn. »Pillath« estis la sola libro, kiu donis al ni almenaŭ germanajn popolkantojn Esperantigitajn.“ (Ĝn

posta letero: „Eldono de nova kantaro estas dezirinda. Ne ĉiuj el la konataj tradukoj hodiaŭ estas ankoraŭ favoritoj, gusto kaj prefero aliĝas kun la tempo. Kio plaĉis al la patroj, ne nepre devas plaĉi al la idoj.“)

Li daŭrigas: „En tiu tempo kelkaj el nia grupo (Breslau) komenkis traduki »Schlager«-tekstojn. Junaj homoj ŝatas ludi, kanti, amuzi. Se ili ne havas eblecon por tio en esperantistaj rondoj, ili forrestas aŭ — uzas la germanan lingvon.“

Tiuj ĉi nepre pripensindaj vortoj estas la kaŭzo, ke ni hodiaŭ prezentas denove kelkajn el tiuj ja nur efemeraj sed tamen gravaj kantoj. Ni kontentiĝas publikigi, kun unu escepto, nur la rekantaĵojn, kiuj estas la esence vivanta substanco kaj esperas, ke ili trovos la aprobon de vi, junularo, kaj ne nur la aprobon, sed ankaŭ, ke vi kantos ilin en la kunsidoj, kiam pasis la oficiala parto. Ni volonte akceptas pri ĉi tiu temo viajn — kaj ne nur junulajn — sugestojn, dezirojn, opiniojn kaj tradukojn en la espero, ke tia interŝanĝo estu tre fruktodona.

\*) EP n-ro 1/9151 p. 7.

## Meksika Serenado

Mexico Serenade

Jen serenado el Meksika land'.  
Pri amo kaj pasi' sonoras ĝia melodio'.  
Kaj ĉirkaŭ la mondo resonas la kant'  
De l' serenado el Meksika land'.

Plej bela ino ŝi estis en land'!  
Batadis ŝia kor' dum dolĉa hor' ĉe  
mia kor'.  
Feliĉaj ni estis dum ludis la band'  
La serenadon el Meksika land'.

Si ridetis flustrante „Ĝis morgaŭ“  
Pensis pri nova jam rendevu',  
Mi mensogis flustrante „Ĝis morgaŭ“  
Ĉar mi revidis ŝin ne plu.

La jaroj pasis, revenis vagant',  
Mi vane serĉis ŝin — ĉar monaĥin'  
la amatin'.

La sonoril' vokis: Forsonis la kant'  
De l' serenado el Meksika land'.

Aj, aj, aj, aj, aj, aj, aj, aj,  
Aj, aj, aj, aj, aj, aj, aj, aj.

Bernhard Zenker.

## Eta mevo ...

Kleine Möve ...

Eta mevo  
Ek al Helgoland!  
Korsaluton portu al la amatin'!  
Mi — soleca,  
Forlasita,  
Kaj sopiras ege kisi ŝin.

Helgoland', patroland',  
Hejmoland', belega vi!  
Fojon nur, fojon nur,  
Volus esti mi ĉe vi.

Jfb.

## Ĝis la revid' ...

Auf Wiederseh'n

Deziras mi revidi vin,  
Ne restu longe for!  
Ĉar kiam vi forlasas min  
Sopiras mia kor'!  
Ĉu iam ni revidos nin?  
Demandas mia kor'.  
La estontec' kompensas vin  
Per plej feliĉa hor'.

AB.

## En mia dom'

Bei mir zu Haus

En mia dom'  
Gardeno estas por vi bela,  
En mia dom'  
La suno brilas por ni du,  
En mia dom'  
Feliĉo vin atendas hela,  
En mia dom'

La zorgoj jam ne ĝenos plu,  
Fidela restos mi en ĉiu ag',  
Ĉar iam ĝojos ni je iu hela bela tag'.  
En mia dom'

Gardeno estas por vi bela,  
En mia dom'  
La suno brilas por ni du,  
Revenu do, ne igu min atendi,  
Returnu vin dum floras la rozar'.

AB.

# Multkoloraj sciŝgetoj ★

## ★ EL LA VERDA MONDO

### Majstro

La unua, kiu uzis la vorton „Majstro“, estas D-ro A. Naumann (tiam en Vilno). En la fino de la jaro 1891, A. Naumann verkis originale alegorian mirrakonton „La mirinda liro“, en kiu li unufoje uzis la aluditon vorton. — Anatolo Kolĥ, Varsovio, en „La Ondo de Esperanto“, Julio 1912.

### SAT kaj UEA

Je la fino de la pasinta jaro SAT havis 5264 membrojn en 42 landoj, UEA 11587 asociojn kaj 6170 individuajn en 70 landoj.

### Karlo Marx kaj la artlingvoj

Kion pensis Karlo Marx pri tiu ĉi problemoj? En lia tempo la demando pri artefarita helplingvo ne estis klare difinita kaj ne prezentis sin kiel urĝa problemoj al Marx. Tamen en verko, kiun li pretigis kune kun Engels, nome „Germana ideologio“ li asertis interalie, ke lingvo estas produktaĵo homa kaj evidente la homoj, siatempe, regos ankaŭ ĉi tiun homan produktaĵon.

Tio montras, ke Marx ne kredis al la tiel nomata „naturalismo“ de la ekzistantaj lingvoj, sed pensis pri konscia influo de la homoj sur siajn proprajn lingvojn. Tiu influo povas starigi novan lingvon, kia estas Esperanto, ellaboratan sur la bazo de la ekzistantaj lingvoj.

Fakte, kun la plena konsento de Marx, en la dua kongreso de la Unua Internacio de Laboristoj, kiu okazis en Lozano (Lausanne) en 1867, oni aprobis la jenan decidon:

La kongreso opinias, ke lingvo universala kaj modifoj de la skribmaniero estus laŭ ĝenerala

profito kaj helpus al pli rapida akiro de unueco kaj frateco de la popoloj.

Tiun aserton oni faris en 1867, t. e. kvar jarojn antaŭ la apero de la unua konkreta projekto pri lingvo internacia artefarita: Volapük, kaj dudek jarojn antaŭ la apero de Esperanto!

### 60 jarojn Esperantisto!

Eble la plej malnova, t. e. la plej frutempa, esperantisto estas D-ro Miĥail Solovjev, nun en Brazilio. Naskita en 1874, li esperantistiĝis

## LINGVA KONSULTEJO

### Demando 14

(El „Esperanto“ 1/1951, p. 14.)

La reĝa vinkelo estas denove si mem. — Ĉu „si“ estas ĝusta?

Mm.

### Respondo 14

Ne. „si mem“ estas parto de l' subjekto, kaj „si“ ne povas formi subjekton. Devas esti „ĝi“.

### Demando 15

Por la germana „Zeitungsausschnitt“ estas uzata la traduko „gazeteltranĉaĵo“. Antaŭ nelonge mi legis en la La Ponto 51/1 la tradukon „gazeteltondaĵo“. Oni tondas la harojn, sed ne paperon, kvankam

por la lastnomita ago ankaŭ estas uzata tondilo. Laŭ mia opinio „gazeteltondaĵo“ ne estas korekta.

K. Sch. G.

### Respondo 15

Vi ja mem diras, ke la ago farata per tondilo estas „tondi“. Kaj ĉar per tia ago sendube oni ricevas „Zeitungsausschnitte“, la „gazeteltondaĵo“ estas tute korekta. Aŭ ĉu vi donas al viaj infanoj tranĉilon, kiam ili deziras eligi por si ilustraĵojn el gazeto por ludi? Esperanto povas uzi du verbojn (tranĉi kaj tondi), dum la germana lingvo nur disponas pri „schneiden“ (den Braten schneiden, die Haare schneiden, Papier schneiden).

WERBEN SIE EINEN BEZIEHER FÜR **EP!**

## Por agrable pasigi la tempon

### Silab-enigmo

ba, bar, bi, de, di, do, dor, er, es, far, fer, ge, ge, go, in, ka, ko, ko, kon, lek, li, ma, mar, me, me, men, mi, mo, na, na, ne, nen, no, no, o, o, or, par, po, po, pres, pris, ri, ro, sa, si, so, so, so, ta, ta, te, tes, ti, tis, to, to, to, to, to, to, to, u, zo, zo.

El la ĉi-supraj 65 silaboj formu 21 vortojn kun jena signifo:

1. Akvoveturilo, 2. delikata ŝtofo, 3. el la familio de musteloj, 4. dikfingro, 5. protestanta dekanato, 6. lasta volo, 7. rita vesto, 8. multedro, 9. luksa planko, 10. ĥemia dolĉigilo, 11. posttagmanĝa dormeto,

12. terparto, 13. ŝip-etaĝo, 14. Biblia libro, 15. korpoparto, 16. muzikinstrumento, 17. ĉiela nutraĵo, 18. vulgara komikaĵo, 19. semajntago, 20. kolorilo, 21. antikva azia regiono.

La kvaraj literoj, legate de supre, rezultigas ĝeneralan sentencon.

### Vizitkart-enigmo

Edina MORZO

Ni jam eltrovis, ke samideanino Morzo loĝas en la ĉefurbo de Italujo. Sed en kia stato ŝi estas?

### Solvo de la enigmoj el n-ro 4

#### Plenig-enigmoj I kaj II.

I. 1. karot, 2. ekran, 3. pokal, 4. kankr, 5. eŭnuk.  
II. 1. limak, 2. blank, 3. balon, 4. smalt, 5. nebul.

#### Kruevort-enigmo

Horizontale: 1. Fatamorgan, 7. ilia, 8. pint, 9. zon, 11. sagu, 12. da, 13. kelo, 14. erp, 15. jam, 16. radii, 18. negr, 20. delt, 21. obolo, 23. ben, 24. mor, 25. stan, 27. el, 28. in, 29. util, 30. aga, 31. greg, 32. agac, 33. kontrolilo.

Vertikale: 1. Fizionomio, 2. aloo, 3. tin, 4. opal, 5. rigor, 9. kapitulaco, 11. sem, 12. dril, 13. Karl, 14. Eden, 15. Igor, 17. Aden, 19. ebon, 22. ostet, 23. bal, 26. tigr, 27. egal, 29. urn, 30. agi, 31. go, 32. al.



# UNIVERSALA KONGRESO EN GERMANUJO!

Für deutsche Esperantisten unter ausländischen Sprachfreunden  
Kaj por eksterlandaj samideanoj en Germanujo estas same utila:

## Esperanto in der Tasche

kun siaj multaj parolturnoj trafaj kaj praktikaj en la germana kaj Esperanta lingvoj.

Por eksterlandanoj ni liveras senpage specialan aldonan folion: La Prononco de germanaj vortoj kaj Registro de Enhavo

### Neŭe Anhängere für Esperanto webben!

Zu unseren zwei Flugblättern „Esperanto auf einem Blatt“ und „Unser Weg: Esperanto“ kommen jetzt zwei neue

### Wir rufen Euch, Jungen und Mädels

4 Seiten im Format 10×21 cm, erste Seite zweifarbig

bis 1000 Stück 5 Pf  
über 1000 Stück 4 Pf

### Gegen Esperanto?

Ein Nachdruck des Leitartikels aus der Februar-Nummer der EP. Alle Einwände gegen Esperanto werden stichhaltig widerlegt!

Bis 1000 Stück 5 Pf  
über 1000 Stück 4 Pf

Bitte beachten Sie die Beilage dieser Nummer!

Esperanto-Abteilung  
der Limburger Vereinsdruckerei GmbH,  
Limburg/Lahn

### 6,60 DM kostet der gebundene Jahrgang 1950 der Esperanto-Post

Machen Sie Ihren Bekannten, die für Esperanto sind, eine Freude und schenken Sie einen gebundenen Jahrgang 1950 unserer Zeitschrift. Halbleinen gebunden mit Titelaufdruck. Bestellen Sie bald - es ist nur eine kleine Anzahl vorhanden. Im Preis sind die Versandkosten enthalten.

Esperanto-Abteilung  
der Limburger Vereinsdruckerei  
GmbH., Limburg/Lahn



Das Lehrbuch „Wir lernen Esperanto“ war mein Lehrmeister. Es zeigte mir in kurzer Zeit den Weg, mit Ausländern zu korrespondieren. Ein vorzügliches Werk!

so schreibt einer der vielen Benutzer unseres Lehrbuches von W. und H. Wingen. Unterrichten auch Sie in Ihrem nächsten Kursus mit „Wir lernen Esperanto“! Preis 2,- DM plus Porto einschließlich Wörterverzeichnis und „Merkblatt für Kursleiter“. Schlüssel dazu 80 Pf plus Porto.

Erhältlich durch jede Buchhandlung oder direkt bei der

Limburger Vereinsdruckerei GmbH,  
Limburg/Lahn · Postfach 39

## Internationale Nachkongress-Woche in Schifferstadt vom 12. bis 19. August

### PROGRAMM

- 12. August: Gesellschaftsabend mit Begrüßung durch den Bürgermeister
- 13. August: Fahrt nach Speyer, Dombesichtigung
- 14. August: Wanderung in die Altrhein-Gewässer
- 15. August: Fahrt nach Neustadt (Weinstraße), Hambacher Schloß
- 16. August: Vormittags frei. Nachmittags geselliges Zusammensein im Freien
- 17. August: Besuch von Mannheim und Heidelberg. Nachmittags auf dem Heidelberger Schloß
- 18. August: Schifferstädter Sehenswürdigkeiten. Gesellschaftsabend. Abschiedsfeier
- 19. August: Distriktkonferenz in Schifferstadt

### KOSTEN

Die Kosten der Nachkongress-Woche einschl. Unterkunft (Gemeinschaftsquartier), voller Verpflegung, Besichtigungsfahrten und Eintrittsgelder betragen pro Person:

vor dem 10. Juli 34,- DM  
nach dem 10. Juli 37,- DM

(Für Einzelzimmer wird ein angemessener Zuschlag erhoben.)

Anmeldungen an EKO-Centro Karger, (22b) Schifferstadt, Pfalz, Baumgartenweg 2.  
Zahlungen an Raiffeisen-Kasse Schifferstadt (Postkongresso).

R. C. Muschler

# La Nekonatino

aperos kiel libro.

Preso sur bona papero

La broŝurita eldono kostos 2,- DM,

la bindita 3,- DM, plus 10% por sendo kai afranko.

Mendu baldaŭ. Bonega donaco por viaj gekonatoj ankaŭ en eksterlando. Bonvolu uzi la ĉi-almetitan pagilon.

Esperanto-Fako de Limburger Vereinsdruckerei · Limburg/L.

## ● Eine Zahlkarte

liegt dieser Nummer bei, um Ihre  
Werbearbeit zu erleichtern.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

